

Luise Hensel,
Noktopreĝo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Lacas mi je l' tagofin'
Kaj mi ripozigas min.
Fermas la okulojn mi,
Gardu min, ho kara Di'!

Se maljuston faris mi,
Patro, ĝin indulgu Vi!
Via graco tiom da
Pekoj rebonigas ja.

Ĉiujn, kiujn konas mi,
Lasu nun ripozi, Di',
Ĉiujn homojn sur la Ter'
Nokte gardu de danĝer'!

Faru, ke malsana kor'
Resaniĝu, ho Sinjor',
Kaj ke de l' ĉiel' la lun'
Vidu sur la mondon nun!

*Traduko de la Germana poemo "Nacht-
gebet" de LUISE HENSEL (*30.03.1798 –
†18.12.1876) en Esperanton de MANFREDO
RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str.
16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04)
en 1984-04.*

MR-075-4 / Arg-427-841 (2014-11-01
20:29:11)

Luise Hensel,
Nachtgebet

Müde bin ich, geh zur Ruh',
schließe beide Äuglein zu;
Vater, laß die Augen dein
Über meinem Bette sein!

Hab ich Unrecht heut' getan,
Sieh' es, lieber Gott, nicht an!
Deine Gnad' und Jesu Blut
macht ja allen Schaden gut.

Alle, die mir sind verwandt,
Gott, laß ruhn in Deiner Hand!
Alle Menschen, groß und klein,
Sollen Dir befohlen sein.

Kranken Herzen sende Ruh',
Nasse Augen schließe zu;
Laß den Mond am Himmel stehn
Und die stille Welt besehn!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas LUISE HENSEL
(*30.03.1798 – †18.12.1876), publikigita 1816.*

Arg-427-840 (2014-11-01 20:36:52)

*Pri la poetino vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Luise_Hensel. La teksto de la kanto trovi-
ghas interalie en <http://www.volksliederarchiv.de/text1370.html> kaj en <http://www.christliche-gedichte.de/?pg=6201>. La muziknotoj
troveblas en [http://www.lieder-archiv.de/muede_](http://www.lieder-archiv.de/muede_bn_ich_geh_zur_ruh-notenblatt_100168.html)
[bn_ich_geh_zur_ruh-notenblatt_100168.html](http://www.lieder-archiv.de/muede_bn_ich_geh_zur_ruh-notenblatt_100168.html).*